

KATALUNA ESPERANTISTO

DUMONATA GAZETO

Organo de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
kaj de la INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ



JANUARO-FEBRUARO 1931

N-RO 175

700.014-03

Primer Manual d'Esperanto

en kataluna lingvo

Primer Manual de Esperanto

en hispana lingvo

32 p. - Unu ekzemplero: Ptoj. 0'25

La hispana eldono estas en preparo

KATALUNA

ANTOLOGIO

—
DUA ELDONO
—

DIKA VOLUMO KUN 416 P., 16 × 22 CM.

PREZO: 10 PESETOJ

PLUS SENDKOSTOJ

KATALUNA ESPERANTISTO

ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

ADRESO: Duran i Bas, 8 - BARCELONA

JARABONO:

Enlande: 5 pesetoj
Eksterlande: 6 pesetoj

DIREKTORO:

JAUME GRAU CASAS, L. K.

OFICIALA PARTO.

Al la iamaj membroj de "Kataluna Esperantista Federacio"

Ni devas komuniki al kelkaj gesamideanoj, kiuj fariĝis abonantoj de KATALUNA ESPERANTISTO, ke la fakto de tiu abono ne supozas aliĝon al K. E. F.

Por fariĝi KEF-ano estas necese pagi 10 centimojn ĉiumonate al sia Grupo, se tiu aliĝis al K. E. F. Se via grupo ne ankoraŭ aliĝis al la Federacio, vi devas pagi 1'20 pesetojn por la tuta jaro. Se vi ne apartenas al iu ajn grupo en la katalunlingva teritorio, vi devas pagi, por esti membro de K. E. F., 2'50 ptojn. ĉiujare.

Ĉiuj esperantistaj grupoj, simpatiantoj, societoj, institucioj, k. c., povas fariĝi Membro-protaktantoj de K. E. F. pagante unu peseton ĉiumonate, minimume.

HELPU AL K. E. F. KAJ AL ĜIA PRESORGANO "KATALUNA ESPERANTISTO"!

Nova komitatano de K. E. F.

La fervora samideano S-ro Jacinto Comella, el Vich, kiu tiel bone organizis nian dekunan katalunan kongreson de Esperanto, nun loĝadas dumvintre en Barcelona kaj tial povos havigi al ni sian valoran helpon, en la tasko direkti nian federacion. Li estas elektita en la Direktan Komitaton de K. E. F.

ASSEMBLEA GENERAL ORDINARIA PER AL DIA 19 D'ABRIL DE 1931.

Tots els adherits a la nostra *Federació Esperantista Catalana*, individuals i col·lectius, són convocats a la dita assemblea, la qual tindrà lloc al nostre estatge, carrer Duran i Bas, 8, principal, el dia 19 d'abril de 1931, a les 10 del matí, sota el següent.

Ordre del dia: 1. Lectura i aprovació de l'acta de l'Assemblea General anterior. 2. Raport del Secretari. 3. Lectura i aprovació de l'Estat de comptes. 4. Proposicions. Precs i preguntes. 5. Reelecció del Comitè Directiu.

Esperem que tots els federats voldran aportar llur ajuda, assistint personalment a dita assemblea.

El Secretari: EDUARD CAPDEVILA

ESTATUTS DE LA FEDERACIO ESPERANTISTA CATALANA.

Article primer.—L'agrupació general d'esperantistes en terres de llengua catalana es denominarà, en català, "Federació Esperantista Catalana", i en Esperanto, "Kataluna Esperantista Federacio" (K. E. F.)

Article segon.—L'objecte de la "F. E. C." és la unió d'entitats i individus esperantistes en terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto, i per a donar compliment als acords i consells que afectin a la col·lectivitat, provinents dels Congressos Internacionals o dels nuclis directors de la llengua del Dr. Zamenhof.

La "F. E. C.", sempre que les circumstàncies econòmiques ho permetin, s'adherirà, pagant la quota corresponent, a la "Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Societoj".

Article tercer.—La "F. E. C.", serà integrada per membres actius i protectors.

Per a la classificació dels actius es tindrà en compte el següent:

Els socis actius es dividiran en socis col·lectius i isolats.

Els socis col·lectius pagaran, per mitjà de la seva entitat i per cada un dels socis que la mateixa tingui, la quota de 0'30 ptes. trimestrals.

Els socis individuals que acreditin pertànyer a una entitat esperantista, no adherida a la Federació, hauran de pagar, solament, una quota de 1'20 ptes. anualment.

Els socis isolats pagaran una quota de dues pessetes amb cinquanta cèntims anualment.

Els socis protectors (individus o entitats) pagaran una quota de 12 ptes. cada any, com a mínim.

Article quart.—La "F. E. C." serà regida per una Junta, renovable cada any, composta de: President, vice-President, Secretari, vice-Secretari, Caixer, Comptador, Bibliotecari i dos Vocals.

Article cinquè.—La Junta de la "F. E. C." cridarà, almenys una vegada a l'any, si és possible en diferents localitats, durant la primavera i en dia festiu, els seus associats a Assemblea o Congrés general, en la qual, prèvi ordre del dia, es donarà compte als federats dels treballs i gestions fets pel referit Comitè Directiu durant el temps del seu exercici; s'acordarà, si és possible, el lloc on hagi de celebrar-se el pròxim Congrés o Assemblea, es nomenarà els individus que hagin de formar la Junta pel següent exercici i es discutiran les proposicions que hagin estat presentades 30 dies abans del Congrés o Assemblea i, d'ésser possible, hagin estat publicades en la revista i incloses en l'ordre del dia.

Article sisè.—La Junta permetrà la constitució de seccions dins la Federació.

Aquestes seccions, que podran ésser de caràcter ben autònom, hauran de regir-se per un reglament interior, en el qual es cedixin, com a mínim, dos llocs, en els corresponents Comitès de Secció, al Consell Directiu de la Federació.

Article setè.—Tots els acords de les Assemblees o Congressos seran presos per majoria de vots dels socis assistents. Les esmenes que puguin presentar-se a aquest reglament deuran ésser presentades amb la deguda antelació per tal d'incloure-les en l'ordre del dia i publicar-les en llur totalitat, puix que només podran ésser discutides i estudiades en les Assemblees o Congressos generals.

Article vuitè.—Tots els socis actius, individuals o col·lectius, tindran veu i vot en les Assemblees o Congressos generals a les quals assisteixin.

Article novè.—Aquesta "F. E. C." podrà actuar mentre compti amb dues entitats adherides o 30 membres isolats. En cas de dissolució, previ acord de la "F. E. C.", els cabals existents o que resultin de la liquidació passaran a la "INTERNACIA CENTRA KOMITATO DE LA ESPERANTO-MOVADO", domiciliada a Ginebra, per a la propaganda de l'Esperanto. Si aquella entitat Central no existís en els moments de la dissolució, podrà la Junta General de Socis acordar el fi dels cabals i objectes en existència.

Article transitori.—La "F. E. C." estarà domiciliada a Barcelona, carrer de Duran i Bas, núm. 8, principal.

Barcelona, 9 d'agost de 1930. — El President accidental, MANUEL RODELLAR.

LA ELSORĈIĜO, de Pierre Loti.

III

Silenta estis ŝia lasta tagmanĝo en la familia hejmo, inter tiuj du virinoj sekrete malamikaj unu al la alia, la instruistino kaj la severa maljunulino.

Poste, ŝi retiriĝis en sian ĉambron, kie ŝi dezirus sin enŝlosi per duobla seruro; sed la ĉambroj de la turkaj virinoj tute ne havas serurojn; decis kontentigi sin per instrukcio donata al Kondja-Gul por ĉiuj servistinoj aŭ sklavinoj tage kaj nokte atentaj kaj pretaj, laŭkutime, en la vestibloj, en la longaj koridoroj de ŝia ĉambraro, kvazaŭ gardohundoj familiaj kaj maldiskretaj.

Dum tiu lasta al ŝi restanta tago, ŝi volis prepariĝi kvazaŭ por la morto, ordigi siajn paperojn kaj mil malgrandajn memoraĵojn, precipe bruligi, bruligi pro timo al la rigardo de la nekonsanta viro kiu post kelkaj horoj estos ŝia mastro. La malespero de ŝia animo estis senkonsola, kaj ŝia teruro, ŝia ribelemo kreskadis.

Ŝi sidiĝis antaŭ sia skribotablo, kie oni reŝlamigis la kandelon por komunikigi ĝian fajron al tiom da misteraj leteretoj dormantaj en la tirkestoj el blanka lako; leteroj el ŝiaj amikinoj hieraŭ edziniĝintaj aŭ tremantaj antaŭ edziniĝo; leteroj en lingvoj turka, franca, germana, angla, ĉiuj kiantaj ribelon, kaj ĉiuj venenigitaj de tiu granda pesimismo kiu, en niaj tempoj, maltrankviligas la turkajn haremojn. De tempo al tempo ŝi relegis paragrafon, malgaje hezitis, kaj poste, tamen, alproksimigis la folieton al la pala flameto, apenaŭ brilanta, pro la suno. Kaj ĉio ĉi, ĉiuj sekretaj pensoj de belaj junaj virinoj, iliaj moderigataj indignoj, iliaj vanaj plendoj, ĉio ĉi faris cindron, kiu amasiĝis kaj miksiĝis en kupra fajrujo, sola orienta meblo en la ĉambro.

Jam elĉerpitaj la tirkestoj, detruitaj la konfidencioj, restis antaŭ ŝi granda kajero kun ora fermilo, kiu estis plena de franceverkitaj folioj... Ĉu ankaŭ tion bruligi?... Ne, ŝi jam ne sentis sin kun sufiĉe da kuraĝo. Tio estis tuta ŝia vivo de junulino, ĝi estis ŝia intima ĵurnalo komencata la tagon de ŝiaj dek-tri jaroj, —la funebran tagon kiam ŝi vestis la *tcharchaf* (laŭ tiea diresprimmo), tio estas, la tago kiam jam por ĉiam decis kaŝi al la mondo sian vizaĝon, enŝlosi sin, fariĝi unu el tiuj sennombraj nigraj fantomoj el Konstantinopolo.

Nenio okazinta antaŭ la vualiĝo estis notita en tiu ĵurnalo. Nenio el ŝia infaneco de barbara princineteto, tie, meze de la ebonaĵoj el Cirkazio, en la perdita teritorio kie, de du jarcentoj, regadis ŝia familio. Nenio ankaŭ el ŝia ekzistado de mondana junulino, kiam ĉirkaŭ ŝia dek-unua jaro, ŝia patro instaligis kun ŝi en

Konstantinopolo, kie li ricevis de Lia Moŝto la Sultano la titolon de Kortega Marŝalo; tiu periodo estis plena de miroj kaj de eleganta adaptiĝado, kun ankoraŭ lecionoj lernotaj kaj taskoj farotaj, dum du jaroj oni vidis ŝin en festoj, en laŭtennisludoj, en baloj ĉe ambasadorejoj; kun la plej malfacilaj dancantoj el la eŭropa loĝantaro, ŝi estis valsinta tute kiel granda fraŭlino, tre invitata, ŝia balkarto ĉiam plena, ŝi allogis per sia rava vizaĝeto, per sia eleganteco, per sia lukso, kaj ankaŭ per tiu de neniu imitebla mieno, tiu sinteno samtempe impona kaj dolĉa, samtempe tre timema kaj tre fiera. Kaj, jen, iun tagon, en balo por junuloj okazanta en la angla ambasadorejo, oni demandis: "Kie ŝi estas, la Cirkazianineto?" Kaj enlandanoj simple respondis: "Ha, ĉu vi ne scias? Ŝi ĵus survestis la tcharchaf." — (Ŝi surmetis la tcharchaf, tio estas: finita, forŝtelita kvazaŭ sorĉe; neniam plu oni revidos ŝin; se hazarde oni renkontas ŝin, pasantan sur iu fermita veturilo, ŝi estos nur nigra figuro, nerekoncbla; ŝi estas kvazaŭ mortinta...)

Do, kun siaj plenumitaj dek-tri jaroj, ŝi eniris, obeante la neflekseblan leĝon, en tiun vualitan mondon, kiu, en Konstantinopolo, vivas apud la alia, kiun oni tuŝetas en ĉiuj stratoj, sed kiun oni ne devas rigardi kaj kiu, post sunmalleviĝo, kaŝiĝas malantaŭ la kradoj; en tiun mondon, kiun oni sentas ĉie ĉirkaŭ si, konfuzantan, allogantan, sed nepenetreblan, kaj kiu observas, konjektas, kritikis, vidas multajn aferojn tra sia eterna masko el nigra gazo, kaj tuj divenas kion ĝi ne vidas.

Subite mallibera, en la aĝo de dek-tri jaroj, inter patro ĉiam oficanta en la Palaco kaj rigida avino sen videbla karesemo, sola en sia vasta loĝejo en Kassim-Pacha, meze de kvartalo de malnovaj princpalacoj kaj tombejoj, kie, post krepusko, ĉio fariĝis timo kaj silento, ŝi pasie sin donis al studado. Kaj tio daŭris ĝis ŝiaj dudek du jaroj hodiaŭ plenumataj, tiu fervoro ĉion koni, ĉion profundigi, literaturon, historion aŭ transcendan filozofion. Inter tiom da junaj virinoj, ŝiaj amikinoj, tre kleraj ankaŭ pro la favora mallibereco, ŝi fariĝis famulineto kies juĝojn kaj senpekajn aŭdacojn oni laŭdis, samtempe imitante ŝiajn multekostajn elegantajojn, precipe ŝi estis kvazaŭ la standardisto de la virina ribelo kontraŭ la severaĵoj de la haremo.

Malgraŭ ĉio, ŝi ja ne bruligos tiun ĵurnalon komencitan la unuan tagon de la tcharchaf! Sed prefere ŝi konfidis ĝin, tute sigelitan, al certa kaj iom sendependa amikino, kies tirkestoj bonŝance ne estas esplorotaj de edzo. Kaj kiu scias, en estonteco, ĉu ne estos iam eble repreni ĝin kaj plilongigi ankoraŭ?... Ŝi precipe volis ĝin konservi ĉar ŝi preskaŭ fiksitis en ĝi okazintaĵojn el sia vivo morgaŭ ĉesonta, feliĉajn alitempajn momentojn, printempajn tagojn pli helajn ol la ceteraj, vesperojn da plej rava nostalgio en la malnova rozplena ĝardeno, kaj promenadojn sur la mirbela Bosforo, kun akompano de siaj tiel karaj kuzinoj. Ĉio

ĉi ŝajnus al ŝi pli nerevokeble perdita en la abismo de la tempo, se la kompatinda ĵurnalo estus jam detruita. Ĝia verkado estis cetere la granda rimedo kontraŭ ŝia melankolio de enmurigita junulino, — kaj jen venis al ŝi la deziro ĝin daŭrigi eĉ nun, por trompi la malesperon de tiu lasta tago... Ŝi restis, do, sidanta antaŭ sia skribotablo, kaj reprenis sian plumingon, kiu estis ora vergeto plena de oraj rubenetoj. Se ŝi alprenis la francan lingvon de la komenco de tiu ĵurnalo, en la unuaj folioj jam verkitaj antaŭ naŭ jaroj, la kaŭzo estis precipe eviti ke ŝia avino aŭ kiu ajn el la hejmo ŝatu ĝin legi. Sed, de proksimume du jaroj, tiu franca lingvaĵo, kiun ŝi prizorgis kaj elpurigis kiel eble plej multe, celis nerealan leganton. (Fraŭlina ĵurnalo estas ĉiam destinata al leganto, fiktiva aŭ reala, nepre fiktiva koncerne turkan virinon.) Kaj tie ĉi la leganto estis malproksima, tre malproksima persono, por ŝi preskaŭ neekzistanta: la romanverkisto Andreo Lhéry!... Ĉio estis nun verkata por li sola, eĉ imitante, senvole, iom lian manieron; tio prenis la formon de leteroj al li adresitaj, kaj en kiuj, por pli bone fari al si la iluzion lin koni, li estis nomata per lia nomo: Andreo, simple, kvazaŭ vera amiko, granda frato.

Nu, do, tiun vesperon, jen kion skizis la maneto per tro belaj ringoj ŝargata:

18an Aprilo 1901^a

“Mi neniam parolis al vi pri infaneco, Andreo, ĉu ne vere? Vi devas tamen scii: mi kiu tiel civilizita ŝajnas al vi, funde mi estas barbarineto. Io restos ĉiam en mi el la junulino el liberaj spacoj, kiu iam ĉevalgalopadis kun grinco de armiloj, aŭ dancis en la heleco kun tintado de siaj arĝentaj zonoj.

Kaj, malgraŭ la tuta glazuro de la eŭropa kulturo, kiam mia nova animo, de kiu mi sentas min fiera, mia animo de pensanta estaĵo, mia konscia animo, kiam do tiu animo tro multe suferas, estas la rememoroj de mia infaneco tiuj kiuj revenas trudeme al mi. Ili reaperas persistaj, koloraj kaj brilaj; ili montras al mi helan landon, perditan paradizon, al kiu mi ne plu povas *nek volus* reiri; cirkazia vilaĝo, tre malproksima, preter Koniach, kiu nomiĝas Karadjamir. Tie, mia familio regadas de sia elveno el Kaŭkazo. Miaj prauloj, en sia lando, estis khans de Kiziltepe, kaj la tiama sultano donacis al ili feŭde la landon Karadjamir. Tie, mi vivadis ĝis la aĝo de dekunu jaroj. Mi estis libera kaj feliĉa. La cirkaziaj fraŭlinoj estas senvualaj. Ili dancas kaj babilas kun la fraŭloj, kaj laŭ propra koro elektas sian edzon.

Nia domo estis la plej bela el la vilaĝo, kaj longaj akaciaj aleoj el ĉiuj flankoj kondukis al ĝi. Ankoraŭ la akacioj ĉirkaŭis ĝin laŭ granda cirklo, kaj, je la plej malgranda ventblovo, ili balancigis, kvazaŭ homaĝe la branĉaron; tiam parfumitaj petaloj neĝfaladis. Mi revidas en miaj revoj fluantan riveron... El la granda salono oni aŭdis la murmuron de ĝiaj rapidantaj onde-

toj. Ho! kiel ili rapidis en sia fluado al la nekonataj malproksimajoj! Kiam mi estis infano, mi ridis vidante ilin kolere disrompiĝi kontraŭ la rokojn.

En la direkto al la vilaĝo, antaŭ la domo, etendiĝas vasta libera spaco. Tie ni dancadis, laŭ cirkazia ritmo, je la sono de niaj malnovaj muzikiloj. Duope aŭ are; ĉiu vestita per blanka silko, florgirlandoj en la haroj. Mi revidas miajn tiamajn kunulinojn. Kie ili estas hodiaŭ?... Ĉiuj estis belaj kaj mildaj, kun longaj okuloj kaj freŝaj ridetoj.

En krepusko, somere, la cirkazianoj de mia patro, ĉiuj junuloj el la vilaĝo, lasis siajn taskojn kaj ĉevalrajdis tra la ebenaĵo. Mia patro, malnova soldato, metis sin antaŭ ili kaj kondukis ilin kvazaŭ por atako. Tio okazis en la ora horo kiam la suno estas kuŝiĝonta. Kiam mi estis malgranda unu el ili prenis min sur la seĝon; tiam mi ebriiĝis de tiu rapideco, kaj de tiu pasio kiun la tutan tagon senbrue eligis la tero ardanta kaj vespere krevis per bruo de armiloj kaj sovaĝaj kantoj. Tuj poste la horo ŝanĝis sian nuancon; ĝi ŝajnis fariĝi la purpura horo de batalvesperoj..., kaj la rajdantoj ĵetis al la vento militkantojn. Poste ĝi fariĝis la horo rozkolora kaj opala...

Ŝi haltis en tiu ĉi horo "opala", demandante al si ĉu tiu vorto ne estus tro afekta por plaĉi al Andreo, kiam subite Kondja-Gul, malgraŭ la malpermeso, enpaŝis en la ĉambron.

— Li estas tie, mastrino!! Li estas tie!...

— Li estas tie, kiu?

— Li, la juna bejo!!... Li venis interparoli kun via patro, la paŝao, kaj estas tuj elironta. Rapidu kuri al via fenestro, vi vidos lin surrajdi la ĉevalon!

Al kio la princineto senmove respondis, kun glacia trankvileco kiu preskaŭ konsternis la bonan Kondja-Gul:

— Kaj nur por tio vi ĝenas min? Mi lin vidos ankoraŭ ĉiam tro baldaŭ, tiun! Krom tio ke ĝis maljuneco mi povos lin revidi laŭplaĉe!

Ŝi diris tion precipe por bone atestiĝi, antaŭ la servistaro, sian malŝaton al la juna mastro. Sed, tuj kiam Kondja-Gul foriris konfuzite, ŝi alproksimiĝis tremante al la fenestro: li ĵus surrajdis la ĉevalon, en sia bela oficiruniformo, kaj trote forrajdis, laŭlonge de l' cipresoj kaj tomboj, sekvate de sia servosoldato. Ŝi havis tempon vidi ke efektive liaj lipharoj estas blondaj, eĉ laŭ propra gusto tro blondaj, sed ke li estas ja bela fraŭlo, kun sufiĉe fieraj sinteno. Tamen li pro tio ne ĉesis esti la malamiko, la trudata mastro neniam akceptota en la intimon de ŝia animo. Kaj rifuzante al si pli longe okupi sin pri li, ŝi revenis sidiĝi antaŭ la skribotablo,—kun tamen iom da sangoruĝiĝo en la vangoj,—por daŭrigi la ĵurnalon, la leteron al nereala konfidenciulo:

... la rozkolora horo (simple, la rozkolora horo; opala estis forstrekita), la rozkolora horo kiam la rememoroj vekigis, kaj

la Cirkazianoj rememoris pri la lando de siaj prauloj; unu el ili eldiris ekzilkanton, kaj la aliaj malrapidigis la marŝon, por aŭskulti tiun voĉon izolan kaj malrapidan. Poste la noro estis violkolora, kaj freŝa kaj dolĉa, kaj la tuta ebenaĵo ekkantis la himnon de amo... Tiam la rajdantoj returnis la bridojn kaj rapidigis sian galopadon por reveno. Sub iliaj paŝoj la floroj mortadis kun lasta parfumado; ili radiis; ili kvazaŭ portis kun si sur siaj armiloj la tutan fluidan arĝenton disversitan de l' somera krepusko.

Malproksime antaŭ ili, brulhelaĵo montris la etan punkton kie la akacioj el Karadjamir grupiĝis, meze de la plata kaj silenta stepo. La helaĵo pligrandiĝis, kaj baldaŭ ŝanĝiĝis en altega flamanta flagraĵo kiu lekis la unuajn stelojn; ĉar tiuj en la vilaĝo restintaj bruligis grandajn fajrojn, kaj ĉirkaŭ ili ĉio estis dancoj de fraŭlinoj, ĉio estis kantoj, ritmitaj per la svingoj de blankaj drapoj kaj malpezaj vualoj. La junaj amuziĝis, dum la maturaj viroj sidadis ekstere fumante kaj la patrinoj, tra la fenestraj puntaĵoj, sekrete observis la amon venantan al iliaj infanoj.

En tiuj tagoj mi estis reĝino. Tewfik-Pacha mia patro kaj Seniha mia patrino amis min super ĉio, ĉar la ceteraj iliaj infanoj estis mortintaj. Mi estis la sultanino de la vilaĝo; neniu alia posedis tiel belajn robojn, nek orajn aŭ arĝentajn zonojn tiel arte ĉizitajn; kaj, kiam tie pasis unu el tiuj vendistoj venintaj el Kaŭkazo kun sakoj plenaj de multekostaj ŝtonoj, kaj de faskoj da delikataj silkoj ore striataj, ĉiu sciis ja ke en mia domo li unue devas eniri; neniu kuraĝus aĉeti simplan skarpon tiel longe kiel la paŝaidino ne estos mem elektinta siajn ornamaĵojn.

Mia patrino estis diskreta kaj dolĉa. Mia patro estis bona kaj oni sciis lin justa. Ĉiu trapasanta fremdulo povis frapi nian pardonon, la domo estis lia. Kvankam malriĉa oni lin akceptis kiel la Sultanon mem. Elpelito, forkuranto,—mi vidis tion,—la ombro de la hejmo lin defendus ĝis la morto de liaj gastigantoj. Sed ve al tiu kiu pretendus uzi al si Tewfik-Pacha por helpi sin en iu malhonesta aŭ nur suspektinda ago: mia patro, tiel bona, estis ankaŭ terura punanto. Mi vidis tion.

Tia estis mia infaneco, Andreo. Poste, mi perdis mian patron, kaj mia patro, tiam ne plu volante resti en Karadjamir sen ŝi, kondukis min kun si al Konstantinopolo, al mia avino, apud miaj kuzinoj.

Nune estas mia onklo Arif-Bey kiu regas tie anstataŭ li. Sed preskaŭ nenio ŝanĝiĝis en tiu nekonata angulo de la mondo, kie la tagoj silente teksadas la jarojn. Oni, mi scias, konstruis mueilon sur la rivero; la ondetoj kiuj nur amuziĝis ŝajnigi sin timigaj estas lernintaj fariĝi utilaj, kaj mi pensas aŭdi ilin priplorisian malnovan liberecon. Sed la bela domo ankoraŭ ĉiam staras inter la arboj, kaj tiun ĉi printempon ankoraŭ, neĝos sur la vojoj kie mi ludis en infaneco. Kaj sendube alia fraŭlineto rajdadas anstataŭ mi kun la rajdistoj...

Dek unu jaroj baldaŭ jam estos forpasintaj preter ĉio ĉi.

La senzorga kaj gaja infano fariĝis junulino jam tre longe plorinta. Ĉu ŝi estus pli feliĉa daŭriginte sian primitivan vivon?... Sed *skribite estis* ke ŝi eliros el ĝi, ĉar *estis necese* ke ŝi ŝanĝigu en pensanta estaĵo kaj ke ŝia vojo kaj la via iam interkruciĝu. Ho kiu diros al ni la kialon, la superan kaŭzon de tiuj renkontoj, kie la animoj apenaŭ tuŝetas sin unu la alian kaj tamen neniam plu ili forgesas tion! Ĉar, ankaŭ vi, Andreo, vi ne plu forgesos min...

Ŝi estis laca de skribado. Kaj cetere la trapaso de la bejo malordigis ŝian memoron.

Kion fari por fini tiun lastan tagon? Ha, la ĝardeno! la kara ĝardeno, tiel saturata de ŝiaj junaj revoj: tien ŝi iros ĝis vespero... En la fundo, benko, sub la centjaraj platanoj, kontraŭ la malnova muro muskotapetita; tie ŝi izoliĝos ĝis la fino de tiu aprila tago, kiu ŝajnis al ŝi la lasta el ŝia vivo. Kaj ŝi sonorigis Kondjagul, por fari la signalon postulatan de ŝia ĉeesto: al ĝardenistoj, veturigistoj, kiu ajn vira servisto, ordono forŝoviĝi el la aleoj por ne profani per siaj okuloj la diineton, kiu intencas tie promeni senvuale...

(*Finota.*)

Trad. el la franca: MARIAN SOLA, L. K.

AL NIAJ ENLANDAJ KAJ EKSTERLANDAJ ABONANTOJ.

Ni devas turni nin al niaj estimataj abonantoj, kiuj ankoraŭ ne pagis sian abonon al "Kataluna Esperantisto", kun la peto, ke ili pagu ĝin tuj.

Niaj enlandaj abonantoj, en kies urbo aŭ vilaĝo ne ekzistas delegito de K. E., povas pagi sian abonon (julio-decembro 1930) per p.markoj 5-centimaj.

Niaj eksterlandaj abonantoj povas pagi sian abonon per fremda mono, prefere per francaj bankbiletoj (20 francaj frankoj).

La abono kostas, enlande, 5 pesetojn por la tuta jaro, kaj 2'50 ptojn. por duonjaro. Por eksterlando kostas, ĉiujare, 6 pesetojn aŭ egalvaloron.

CIGANOJ

Ripoz', konsol' post longa vojo pena:
tendaro, riverborde dissemita;
trankvil' feliĉa sub tegment' stelplena,
de l' nokto, per fajraĵoj heligita.

Jen veturil' post veturil' vicorde;
la ĉevalaĉoj mute kapbalancas;
nomadoj—dormas. Blanka fum' sintorde
el bruletantaj fajroj volve-dancas.

Sendorme, iu sidas riverborde
kaj violonas; klare la respondo
plenigas la trankvilon mild-akorde.

Sopiro de misteraj revoj trilas
al dormaj tendoj pri mirinda mondo,
kie ĉieloj nekonataj brilas.

N. V. RAKITIN

Trad. el la bulgara: IVAN H. KRESTANOV, L. K.

(El la "Bulgara Antologio")

GITANOS.

Repòs, consol, després de la fadiga;
en tendes, vora el riu, gent escampada.
Tranquilatat sota teulada amiga,
amb resplandor d'estels iluminada.

Hi ha carros i més carros en renglera;
els cavalls, emmudits, el cap belluguen.
La gent nòmada dorm. Blanca fumera
surt d'espurnes del foc, que encara juguen.

Algú vetllant, del riu s'està a la vora
i toca el violí: la cantarella
en la dolça quietud sembla que plora.

I el plor i el càntic a les tendes duen
el murmuri d'un món de meravella,
on cels desconeputs amb força lluen.

Traducció catalana de JAUME GRAU CASAS, L. K.

GRAMOFONDISKOJ KUN LA VOĈO DE D-RO ZAMENHOF.

Ĉar la rezultato ne konformiĝas al niaj esperoj kaj la teknikaj malfacilaĵoj estis tiel nevenkeblaj por atingi bonan reproduktaĵon de la malnovaj kaj eluzitaj vaksaj cilindroj, la Eldona Fako de "Kataluna Esperantista Federacio", kiu zorgis, kun la helpo de kelkaj katalunaj samideanoj, pri la reproduktado de la kara voĉo de nia Majstro, post interkonsento kun "Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado", kiu iniciatis la ideon, decidis eldoni nur 50 diskojn.

Tiu ĉi malgranda kvanto devos kovri ĉiujn elspezojn: luo de la fonografa aparato, matrico de la elektraĵoj, k. t. p., kaj pro tio la prezo devos esti iom alta kompare al tiu, kiun oni intencis fiksi se la provo estus sukcesinta kaj ni estus povintaj mendi pli grandan kvanton, de la ODEON-fabriko. Ni do fiksas la prezon kaj liveros ĉiun diskon po DEK pesetoj.

Plie oni devos aldoni la pakaj-kaj sendelspezojn, kiuj valoros proksimume aliajn DEK pesetojn. Tiu ĉi elspezo restos la sama se oni mendas unu diskon aŭ dek, ĉar la poŝta afranko kaj la ligna skatolo same kostas al ni.

Ni rekomendas al ĉiuj interesatoj, ke, se eble, ili centrigu la mendojn de unu sama lando, kaj tiamaniere ni povos ekspedi pakojn enhavantajn 10 diskojn kaj ne unu solan, kaj tiel ili rezultos relative malkaraj.

Interesatoj bonvolu sin turni al KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO, strato Duran i Bas, 8, BARCELONA, kaj bonvolu sendi kun la mendo la koncernan monsumon.

Ni denove atentigas la tutmondan esperantistaron pri tio ke la reproduktado certe ne estas ideala, sed tamen ĝi estas la sola ŝanco posedi la voĉon kaj aŭdi la elparoladon de nia kara Majstro. Ĝi estas, malgraŭ ĉio, vera relikvo por ĉiuj.

Anoncu tuj vian deziron aĉeti la diskon. Ni ne povas garantiĝi ke poste ĉiuj povos ricevi ĝin. La fabriko devigas nin ĉiufoje mendi almenaŭ 50 ekzemplerojn. Kiel ni diras, ni nur mendis tiun malgrandan provizon.

DUA ELDONO DE "KATALUNA ANTOLOGIO".

La presado de tiu granda verko preskaŭ finiĝas. Estas jam presitaj 20 el la 26 kajeroj 16-paĝaj, kiuj konsistigas ĝin, kaj estas sub preso la restantaj. Pro la peza laboro korekti presprovaĵojn de la 416 paĝoj de tiu verko kaj pro la redakto de *Kataluna Esperantisto* kaj *Iberia Esperantista Revuo*, S-ro Jaime Grau Casas ne povis ankoraŭ respondi al amasiĝintaj leteroj de geamikoj enlandaj kaj eksterlandaj. Li petas pardonon al ĉiuj kaj esperas baldaŭ denove ĝui la amikan interkorespondadon.

L'IDIOMA DE L'ESCOLA.

Ocasió malaguanyada

Badem, catalans. Si no badàvem, quan Menéndez Pidal, mesos enrera, féu gestions públiques prop del Ministre perquè s'engués l'ensenyament primari a base de la llengua dels alumnes, la qual cosa féu l'il·lustre president de la "Real Acadèmia de la Llengua" per imperatiu de la seva consciència intel·lectual, si no badàvem, tots els mestres i els pares, els Ajuntaments i Diputacions, totes les entitats populars de Catalunya haurien secundat aquelles gestions al costat de la "Protectora", gairebé única que provà de moure's malgrat la clausura oficial que pesava damunt d'ella.

Ara es belluguen per interès tots els elements de la carcassa viciosa de l'ensenyança oficial, automatitzada. Tot l'engranatge de la màquina, de la carraca, del carromato pedagògic primari espanyol es posa a carrisquejar, a grinyolar tan bon punt s'adona que és qüestió de corregir o superar l'estat o règim docent que no resisteix la crítica pedagògica. Quan es canvia una peça caduca per una de nova que colli bé se'n ressenten totes les velles que resten. I es posen a fer de polítics, a parlar com a polítics conservadors dels vicis que els són favorables i als quals estan fets.

El problema

La qüestió de la llengua de l'escola i sobretot de l'escola de pàrvuls i elemental, no presenta un problema polític, sinó un problema pedagògic. Ací han de parlar les conclusions dels congressos pedagògics universals que han estudiat el bilingüisme a l'escola, o el cas, molt pitjor, de la substitució de la llengua dels pàrvuls per una altra. També han de parlar els Instituts d'Orientació Professional i les altres Entitats tècniques que han fet anàlisis, estudis i estadístiques, l'Institut Jean-Jacques Rousseau, de Ginebra, etc. I els únics que no haurien de parlar són els que per conveniències materials, personals o d'estament poden expressar criteris interessats polítics o professionals.

El senyor Cambó, el senyor Rovira i Virgili, Acció Catalana, etc., poden reclamar una solució política. I ells poden ésser tractats com a polítics. Però nosaltres plantegem el problema pedagògic, i la Pedagogia està per damunt de la política, com l'Arqueologia, el Dret, la Física, l'Electricitat, la Psicologia, etc. La política és l'art i la ciència de servir millor les ciències, la cultura, el progrés, la civilització dels pobles i terres. La política es torna raó de força i deixa d'ésser força de raó quan en comptes de servir al desenvolupament i bon ús de tots els elements naturals de riquesa material i cultural en destrueix cap.

El ministre d'Instrucció ha de resoldre segons la tècnica, segons la pedagogia, un problema que és essencialment tècnic, pe-

dagògic. Ha de consultar o nomenar, si no hi veu prou clar, una comissió composta de Menéndez Pidal i José Ortega Gasset, de la Universitat Central; Lluís de Zulueta, de l'Escola Superior del Magisteri; Lorenzo Luzuriaga, director de la "Revista de Pedagogía"; Moneva Puyol, de la Universitat de Saragossa; Luis Bello, José Gullón, director d'un Grup Escolar de Madrid; Manuel Ainaud, assessor tècnic de la Comissió de Cultura de l'Ajuntament de Barcelona; Alexandre Galí, del Consell de Pedagogia, etc. L'opinió d'aquests senyors, l'opinió, no política, sinó científica d'aquestes autoritats tècniques, ha de pesar més àdhuc que l'opinió de mestres catalans vells fets a ensenyar en castellà—generalment en castellà ben poc recomanable—, puix que és natural que aquests a còpia de la repetició s'hagin viciat de tal manera, que sigui el règim dolent el bo per a ells, i que els costi molt més ara de posar-se a treballar drets que de continuar ajupits.

El senyor Royo Villanova te raó

En el número de 31 de desembre deia en un editorial de l'"A B C" el nostre conegut professor Antonio Royo:

"Cuando yo estudiaba el doctorado me acostumbré a que mis condiscípulos catalanes me hablasen en su idioma y yo les contestaba en castellano."—¿Voleu res més correcte i just?

"Afortunadamente, repito, todas las personas cultas de España leen y entienden el catalán sin haberlo estudiado, y casi lo mismo nos ocurre con el italiano y el portugués."

Això és veritat, tant com que els catalans comprenen abans d'estudiar-los el portuguès i l'italià, i encara més comprendríem l'espanyol, sense que calgui, "doncs", destorbar la formació normal lingüística dels nens catalans, fent-los educar a l'escola en un "idioma" diferent de "l'idioma" natural propi. Com que el provençal, el català, el castellà, el portuguès, l'italià, etc., són dialectes del llatí, són varietats del llatí vulgar i simplificat, si hi ha bona voluntat els comprenem tots fàcilment. Un exemple d'aquesta veritat es troba en el fet dels emigrants italians que van a l'Amèrica hispànica, que essent alguns àdhuc analfabets són allà compresos i s'entenen correntment amb tothom. Alguns emigrants catalans analfabets presenten el mateix fenomen. Ja veu el nostre amic Lluís Bello com es pot convèncer que el català pot anar pel món, pel món llatí, amb el seu idioma. Li ho diu persona tan poc suspecta de catalanisme com el senyor Antonio Royo Villanova. Li ho diuen els fets, la realitat.

Criteri medieval

En "El Liberal", de Madrid, del 20 de gener, a tres columnes del lloc frontal preferent, sota els titulars de "Temas fundamentales" i "El idioma en la enseñanza", Juan Pedro España exposa

el criteri medieval que la importància de l'ús de l'idioma en l'ensenyança està en relació directa amb la seva extensió. Rovira i Virgili, en "El Sol", de Madrid, refutava amb raons de debò aquest criteri materialista, algunes setmanes enrera.

Però el que fa estrany és que persones intel·ligents no es puguin posar d'acord amb elles mateixes, no sàpiguen raonar sobre una mateixa qüestió a base dels mateixos principis que exposen. Si en sabien, el dit articulista hauria de sostenir que l'idioma de l'ensenyança a les escoles de Castella i de tots els països del propi idioma hauria d'ésser l'anglès, puix que tota persona de cultura mitjana sap que la llengua de més extensió és avui la de John Bull i la de l'oncle Sam, la dels "dominions" i dels virregnats anglesos, i de tots els esports i dels dòlars i lliures esterlines i fins del "Firecrest".

Els senyors que defensen aquest principi es contradiuen perquè no en volen l'aplicació en el territori de llur propi idioma, i volen imposar-lo en altres regions, i no precisament a favor de l'idioma cultural de més extensió, l'anglès, sinó a favor de l'espanyol, que no ho és. Aquests senyors confonen els casos particulars i exceptius amb els normals i generals, i us diuen que Pestalozzi no emprà la seva llengua vernacla, i que Conrad, polonès, escriví en anglès, i que Moréas, grec, fou literat francès. I nosaltres sabem que això val tant com dir que el basc Unamuno literàriament és castellà, com els catalans Balmes i Pi i Margall i tants d'altres. Però nosaltres sabem més que això: els retrets justos al llenguatge literari de Balmes i de Pi fets pels millors crítics castellans. Sabem que el criteri d'aquests senyors ja fou rectificat per Ramon Llull, pel Poema de Mio Cid, Dante, Cervantes, Mistral. I aquesta rectificació d'aquells genis avui, és una consciència ciutadana general pròpia de la nostra civilització i sobretot de la moderna ideologia i consciència universals. Sabem, encara, que era molt més justificat el dit criteri medieval a la seva època, quan realment i pràcticament el llatí era la llengua universal de la cultura.

Avui la pedagogia ha avançat tant que fins els literats bons, com Marcel Prévost, anatematitzen les "modes" de posar "nurses" i "Fraulein" als petits francesos, perquè avui se sap que això constitueix normalment un atemptat a la formació lingüística personal. Aquesta ha d'ésser absolutament monolingüe. El poliglòtisme, com una necessitat, es pot admetre, quan la pròpia personalitat lingüística és ben ferma, i sense que mai cap altra llengua prengui el lloc de la pròpia, havent de servir totes les altres únicament com a auxiliars artificials. I encara aquestes, en funció activa, en nombre mínim, segons genial previsió doctrinal i resolutòria del doctor Zamenhof.

DELFI DALMAU.

(De "La Publicitat", 13 febrer 1931).

BIBLIOGRAFIO.

BULTENO DE "BARCELONA STELO", kolekto 1930, 17 × 26 cm., kun bela kovrilo. Ĝi enhavas la raporton pri la agado de la malnova grupo "Barcelona Stelo" (Barcelona-Borrell 253), en la jaro 1930. Redaktita de la fervoraj samideanoj S-ro M. Rodellar, V. Andrés kaj aliaj, en lingvoj esperanta, kataluna kaj hispana. Rimarkinda estas artikolo pri la fruaj tempoj de la Esperanto-movado en Katalunujo.

KONTURO DE OOMOTO, dua eldono, de Oomoto Oficejo, Kameoka (Japanujo). 20-paĝa broŝuro, 11 × 15 cm., pri la esenco kaj celo de nova religio japandevena, kiu kredas je la Dio-homo Onisabro Deguĉi, naskiĝinta en 1870. Li publikigis, en 1921, la verkon *Rakontoj el la Spirita Mondo*, el kies projektitaj 120 volumoj jam aperis 74. Ĝi donas solvojn por ĉio en la mondo, "komencante de grandaj problemoj, kiel estas politiko, ekonomio..., ĝis malgrandaj aferoj pri regado de hejmo aŭ persono.

WIESBADEN, la plej granda sanigbanloko de Germanujo, la mondfama kuracurbo, la belega loĝ-kaj ĝardenurbo. 16-paĝa broŝuro, 20 × 23 cm., kun belegaj ilustraĵoj ĉefe pri la granda kazino kaj bolfontoj.

ESPERANTO & COMMERCE, interesa folio eldonita de "Asocio por la disvastigo de la Franca Komerco per Esperanto", 23 rue Nôtre-Dame-des-Victoires, Paris 2, kiu pritraktas la taskon necesan por atingi ke la komercistoj pli vaste ol ĝis nun uzu Esperanton.

KAJ ĈIO RESTAS PENSO SED NE FARO, de Lakshmiswar Sinha. Eldona Societo Esperanto, Fack 698, Stockholm 1. 16-paĝa broŝuro, 13 × 20 cm., kun bela kovrilo, bone presita, pri interkompreno kaj homara frateco, bone verkita de la hinda samideano kiu tiel trafe propagandis por Esperanto en la nordaj landoj de Eŭropo. Ĝi pledas por reciproka interkonatiĝo inter Azio kaj Eŭropo, inter Oriento kaj Okcidento, kaj reflektas spiriton tre kompreneman kaj simpatian.

ESPERANTO LERNOLIBRO POR POPOLLERNEJOJ, laŭ rekta metodo verkita de Arthur Degen. Unua parto: 1^a-2^alernjaro. Eldonis: Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig, 1930. Belega libro, 15 × 22 cm., 70 paĝoj, kartona kovrilo, kun multaj koloraj bildoj. Tre bona eldonaĵo, kiel kutime ĉe F. Hirt & Sohn. Kvankam nia opinio ne estas tre favora al la "rekta metodo", ni ne dubas ke tiu libro povas doni eĉ tre bonan rezultaton, en la manoj de lerta instruanto. Laŭ nia sperto, rekta metodo taŭgas kiam oni volas eltiri, el lernado de lingvo, *tujan rezultaton, en limigita nombro da okazoj*, sed ne taŭgas por vasta kaj profunda studo de lingvo, kiun oni volas mastri... kaj propagandi.

J. G. C.

ENLANDA MOVADO.

Barcelona.—La Esperantista Societo *Nova Sento* (Independència, 79, Centre Democràtic) okazigis, la 19. de oktobro, honoran vermuton al nia samideano S-ro Artemi Barba, por festi la ricevon de Zamenhof' a skulptaĵo, donacita de samideano Barba. Post kelkaj salutaj vortoj de nia prezidanto S-ro E. Gili, parolis s-ano Barba esprimante sian kontentecon pri la festo. Tuj oni malkovris la buston de nia kara Majstro. Aplauĉoj kaj fortega "Vivu D-ro Zamenhof!" ekaŭdiĝis dum tiu neforgesebla momento por nia societa vivo. Denove parolis s-ano Barba per kortuŝaj vortoj, klarigante sian ĝojiĝon.—Oni aŭskultis salutparolojn de *Centre Democràtic*, *Paco kaj Amo*, *Barcelona Stelo* kaj *K. E. F.*—S-anoj Banet, Pujol kaj Serra, el nia societo *Nova Sento*, aŭdigis belajn paroladetojn rilatantajn al la festo.—Nome de *Nova Sento* s-ano Gili donacis al nia kara honorato skatoleton kun plumo kaj krapono, kaj amiko Barba dankis per afablaj vortoj tian donacon.—Nia prezidanto fermis la feston, dankante la ĉeestantaron kaj ĝojiĝante pro la sukceso. Ni volas esprimi per KE niajn plej sincerajn dankojn al samideano kaj amiko A. Barba, pro lia bonvoleco havigi al ni tian meritplenan laboraĵon, kia estas la busto de nia kara Majstro.—La 20. okt. 1930 komenciĝis en nia societo elementa kurso, gvidata de S-ro A. Domènech Mas. Partoprenas 35 gelernantoj.—J. Banet, *sekretario*.

La malnova grupo *Barcelona Stelo*, en kunveno okazinta la 12. jan. 1931, elektis la jenan komitaton: Prezidanto, S-ro M. Roderlar; Vicprezidanto, J. M. Coll; Sekretario, V. Andrés; Kasisto, E. Martin; Kalkulisto, A. Rubió; Bibliotekisto, J. Pruna; Voĉdonantoj, J. Gili, E. Capdevila, M. Palomera kaj A. López.

Antaŭ kelkaj semajnoj fondiĝis la "Zamenhof-Instituto", per kiu oni celas efikan disvastigon de Esperanto kaj ĝia interna ideo, kaj ankaŭ la disvolvon de U. E. A. La membroj sin nomas Zamenhofanoj, tial ke ili deziras sekvi la konsilojn kaj orientigojn de D-ro Zamenhof, je la servo de interhoma frateco, per internacia lingvo. La Komitato konsistas el: Prezidanto, Valdepeñas; Vic-Prezidanto, Gorgues; Sekretario, Anglada; Vic-Sekretario, Vilà; Kasisto, Campdelacreu; Kalkulisto, Corredó; Bibliotekisto, López; kaj Voĉdonantino, Ullastres. La Instituto, kies provizora Oficejo estas ĉe la Sekretario, strato Sitges, 8, starigis informoservon ĉiulaborte de la 7 ½ ĝis la 8 ½ vespere.

NOVAJ AMAJ POEMOJ

DE

JAUME GRAU CASAS, L. K.

20 originalaj poemoj en facila Esperanto
32 p. - libreto 16 x 22 cm., kun fortaj kovriloj

PREZO: Por Iberio, Ptoj. 0'70; por aliaj landoj, 1 peseto.

Tarifo de reklamoj

Unu p.: Dek pesetoj

Duona p.: Kvin pesetoj

Anonceto pri korespondado: 1'50 pesetoj

IBERIA ESPERANTISTA REVUO

DIPUTACIÓ, 50 - BARCELONA

REDAKTATA EN ESPERANTO

KAJ EVENTUALE EN LA KVAR IBERIAJ LINGVOJ: HISPANA,
PORTUGALA, KATALUNA KAJ BASKA

DUMONATA 48 P. (16 $\frac{1}{2}$ × 24 cm.)

LITERATURO :: INFORMADO :: PROPAGANDO

DIREKTORO - ELDONANTO:

JAUME GRAU CASAS, L. K.

DIREKTORO DE «KATALUNA ESPERANTISTO»

JARABONO:

POR IBERIO: 9 PESETOJ

POR ALIAJ LANDOJ: 1 DOLARO

SCIIGU TUJ VIAN ABONON!